



Festivala Kuriero

5-a de septembro 2020, numero 16

Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

La Internaciaj Letertagoj – 2020

“Vorto pri Samarkando: la urbo pri kiu oni ŝatas pensi, sonĝi kaj paroli”

Karaj amikoj, samideanoj, kolegoj, samteranoj, Baldaŭ denove venos la signifoplena dato kaj festa okazaĵo por la urbo, pri kiu multaj loĝantoj de nia planedo ŝatas pensi, memori, revii kaj paroli. La 18-a de oktobro – la Tago de Samarkando. La evento celas refokusigi nian rigardon sur la alloga belo, unika aromo kaj arkitektura dekoro de la urbo. Tradicie, estas invitataj kontribui ĉiuj, por kiuj Samarkando estas pli ol nura urbo. Por kiuj ĝi estas vivanta memoro, emociplena historio, signifa malkovro, amdeklaro, rendevuejo kaj eĉ sorto. Ĉiuj, kiuj persone spertis la mirindaĵojn de Samarkando en realo, ĉu de malproksime, ĉu estante tuj apude aŭ eĉ nur en siaj pensoj aŭ sonĝoj, konservis neforviŝeblajn impresojn pri la grandioza historia heredaĵo kaj neordinara nuntempa kulturo de la mondfama urbo.



Eble por iuj, ununura vorto sufiĉos por esprimi sian vizion; iuj skribos personan leteron al Samarkando aŭ verkos saluton forme de poemo, kanto, desegnaĵo, foto; aŭ komunikos siajn bondezirojn aŭ sonĝojn por la estonteco de la urbo... Komprenoble, ĉio dirota kaj verkota pliproksimigos nin unu al la alia, unuigos nin ĉirkaŭ la eternaj valoroj, pliiĝos niajn konojn, evoluigos spertojn, plifortigos pacon kaj harmonion – ĉion, kio ebligis al Samarkando atingi majestecon kaj por ĉiam eniri la historion.

Bonvolu sendi viajn reeĥojn, gratulmesaĝojn kaj alispecajn tiutemajn kontribuojn, laŭeble, ĝis la 1-a de oktobro 2020 al imps86@yahoo.com, kvankam la materialoj iutempe estos akceptataj ankaŭ post tiu ĉi dato.

La plej interesaj kontribuaĵoj estos publikigitaj en nialanda gazetararo kaj en la venonta eldono de “Konciza Enciklopedio de Eksterlanda Samarkandiana: Kulturo Unuiganta la Mondon”.

ĈIU ricevita mesaĝo estos danke agnoskita kaj la raporto pri la evento estos sendita al ĈIUJ partoprenantoj.

Atendante vian baldaŭan reeĥon kaj antaŭdankante pro via eventuala asisto kaj kunlaboro, ni deziras al vi kaj viaj proksimumoj fortikan sanon, bonfarton, vivooptimismon kaj bonhumoron!

Sunplenajn bondezirojn el la 2760-jara Samarkando, la urbo de Monda Heredaĵo de Unesko,

Anatolij Ionesov

Enciklopedia projekto “Samarkandiana”

P.O. Box 76, UZ-140100 Samarkando

Uzbekio

Retpoŝto: imps86@yahoo.com

Ni gratulas novan Estraron de TEJO

Nome de la Redakcio de la revuo *Esperanto* ni gratulas la novan Estraron de TEJO, kiu ekoficis la 1-an de septembro! Sukceson, karaj, en la movado!

Dum la periodo 2020–2021 la estraranoj, elektitaj de la Komitato de TEJO, estas:

Charlotte Scherping Larsson – Prezidanto

Carlos Pesquera Alonso – Vicprezidanto

Tomáš Stano – Vicprezidanto

Konstanze Schönfeld (Tuŝka) – Ĝenerala Sekretario

Mung Bui (Feliĉa) – Kasisto

Karina Oliveira – Estrarano


Klára Ertl – Estrarano

Rogier Huurman (Roĉjo) – Estrarano

Robert Nielsen – Estrarano

Sukcesa Tago de Afriko

■ Adjé Adjévi



Malgraŭ kelkaj defioj lige al la reto disvolviĝis kontentige ĉ. 7 horojn la Tago de Afriko kadre de la MondaFest' de UEA la 23-an de aŭgusto 2020. La evento estas la plej granda virtuala Esperanto-renkontiĝo iam okazinta en Afriko laŭ la reprezentitaj landoj kaj nombro de aliĝintoj. Aliĝis oficiale 131 homoj – kvankam en la Zoom-vidbabilejo alvenis homoj, kiuj antaŭe ne registris sin per la retaliĝilo – el 46 landoj de 4 kontinentoj. Plej multnombris afrikaj landoj 18, sekvis eŭropaj landoj 16, Azio estis reprezentita per 6 landoj kaj Ameriko per 5.

Legu plenan tekston de ĉi tiu artikolo, (re)spektu la aranĝon, elŝutu la programan libreton.

Partoprenu en la enketo pri la Virtuala Kongreso!

Koran dankon pro via partopreno en la Virtuala Kongreso de Esperanto – VK! Ni ŝatus ankoraŭ informi:

Tio estis la unua VK! Pro tio, kaj por plibonigi eventualajn estontajn VK-ojn, tre gravas viaj opinio kaj respondoj al la Postkongresa Demandaro:

<https://forms.gle/oY82jEbA8MP1tLZV9>.

Ĉiu registrita enhavo de la VK ankoraŭ disponeblas por spektado en nia virtuala kongresejo: <https://vk.retevent.com/> – ĝis la 20-a de septembro!

Se vi volas rekomendi la enhavon al amikoj, ankoraŭ eblas aliĝi al la VK per <http://vk.mondafest.net/> – tio cetere estas maniero plu subteni nian laboron!



Post la 20-a de septembro la virtuala kongresejo estos fermita, kaj UEA laŭgrade plu disponebligos la registritan enhavon ĉe sia jutubkanalo **UEAviva** – estu bonvena abonon kaj rekomendi nian kanalon!

Se vi faris ekrankopiojn dum la VK, vi bonvenas sendi vian materialon al vk@ikso.net – ni uzos ĝin por speciala historia raporto pri la VK!

Kaj ni esperas revidi vin en Belfasto! Aliĝu al la 106-a Universala Kongreso per la aliĝilo en la Monda Festivalo – <https://uk2021.mondafest.net/> (pago per kreditkarto, kun samtempa aliĝo al UEA 2021) – aŭ rekte en la retejo de UEA: <https://uea.org/kongresoj> (pago per ĉiuj pagmetodoj uzataj de UEA, inkluzive de UEA-kontoj).

Subtenu la laboron de UEA per aliĝo: <https://uea.org/alighoj/alighilo> – jam eblas aliĝi por 2021!

Informoj pri la foto de TEĴA-kunveno trovitaj!

En la 14-a numero de la *Festivala Kuriero* ni publikigis foton de la kunveno de la Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio (TEĴA) kun peto helpi per la informoj, kiu, kie estas sur la foto kaj kiam.

Josip Pleadin sendis detalan informon pri la foto:

“La foto prezentas kunvenon de esperantistoj ĵurnalistoj en 1961 en Harrogate. La kvara en la dua vico (staranta) de maldekstre estas la kroato Vlado Jurković, iama sonregistristo kaj ĵurnalista de la Esperantaj elsendoj de Radio Zagrebo. En la unua vico (sidantaj), la kvina de maldekstre estas Julio Baghy kaj la sesa Zlata Flego el Zagrebo, fratino de Sdrjan Flego. Zlata tiutempe estis ĵurnalistino en Zagrebo. La originalon de tiu foto al Dokumenta Esperanto-Centro transdonis Vlado Jurković.”

Koran dankon!

Dankon al Rob Moerbeek, kiu helpis provlegi tiun ĉi numeron!



TEĴA bezonas vian helpon

Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio (TEĴA) ricevis la suban foton el la arkivo. Ĝi similas al iu eltranĉaĵo el iu ĵurnalo aŭ simile. Se iuj el vi scias, kiu estas sur la foto, kiam ĝi estis farita kaj kie, estus granda helpo, se kontaktos la redakcion de la *Festivala Kuriero*: redakcio@revuoesperanto.org.

Historia foto de TEĴA-kunveno: Kiu konas kiu?



Ne fotu dum la ĵus okazinta UK en Aŭgusto 1997, sed iam en antaŭa kongreso – sed en kiu? Kiu povas helpi por trovi tion kaj indiki, kiuj personoj troviĝas sur ĝi?





Abonantoj jam povas elŝuti la septembran numeron de la revuo "Esperanto".
La papera versio baldaŭ estos dissendita: <https://uea.org/revuoj>

171 | Malferme: De somero al printempo: kie ni en la mondo, kien ni en la tempo
173 | Humphrey Tonkin: Honora Prezidanto de UEA
174 | Virtuala Kongreso: Unua reta versio de la Oratoraj Konkursoj de UEA
175 | Unesko: Unesko eldonis unuan libron en Esperanto: "De ideoj al agoj: 70 jaroj de Unesko"
176 | TEJO: Kursaro de latinidaj lingvoj
177 | Faka Agado: Jen nia jurista asocio: IJEA
178 | Pri la Kongresa Temo
179 | Edukado: Finiĝis interreta publika Esperanto-kurso en Ĉinio

180 | «Mi pensas, ke la kvarantena periodo permesis al multe da homoj alproksimiĝi al ĉi tiu lingvo»
182 | Fake, Science kaj Profesie tra la mondo: Internaciaj Virtualaj Universitato, ekskursoj kaj Faka Forumo
184 | Edukado: Neatendita latentita sukceso
185 | MondaFest': Raporto pri la Tago de Azio kaj Oceanio
187 | Landa agado: Sukcesa praktiko
188 | Faka agado: TADEN 25-jara
189 | Tago de Afriko
190 | Zlatko Tišljariĝis Honora Membro de UEA
191 | Oficiala Informilo

Beletra rubriko

La bruo el l' atiko


originale verkita en Esperanto

(Daŭrigo. La unuan parton legu en la antaŭa numero de la *Kongresa Kuriero*)

■ Jose Carrillo (Ĵosefo, Kanado)

Mi telefonvokis la plagokontroliston. Lia nomo estis Benjameno. Mi eksplikis al li pri la vespereto, kiun mi vidis dum tiu mateno.

Benjameno diris: "Ĵosefo, ne zorgu! Mi estas profesia plagokontrolisto, kaj mi jam kontrolas vesperetojn en domoj dum dudek jaroj." Li klarigis, ke vesperetoj loĝas inter ni. Speciale li menciis la grandajn brunvesperetojn. "Multaj homoj ne scias, ke hodiaŭ ili havas vesperetojn en sia domo, ĉar vesperetoj estas noktaj bestoj, kaj ili moviĝas silente."



Li daŭrigis: "La granda brunvespereto estas sukcesa rakonto. Ĝi povas eniri breĉojn malpli grandajn ol 25 mm longe je 6 mm alte. Ili povas vivi en kavernoj, tuneloj, arbotruoj kaj multaj homaj konstruaĵoj, kiel via domo!" Li ridis.

Tamen, la plagokontrolisto menciis, ke estis stranga maniero, dank' al kiu mi eksciis pri la vespereto.

Malofte vesperetoj flugas dum la tago. Li diris, ke pli ofte homoj vokas lin, kiam estas jam malfrue, kaj kiam ili jam havas flugantan vespereton ene de la domo.

Li diris, ke laŭleĝe li ne povas mortigi la vesperetojn. Do li metos unudirektan pordon ĉe la truo, per kiu la vespereto eniris l' atikon. Tiamaniere la ves-

peretoj povos eliri el l' atiko, sed ili ne povos reeniri.

Li eksplikis, ke preskaŭ ĉiutage vesperetoj devas forflugi de la domo por trovi akvon, aliamaniere ili mortus pro senhidratiĝado.

Finfine li diris: "Ne zorgu! Dum du aŭ tri tagoj, pro la nova unudirekta pordo ĉe la truo, ĉiuj vesperetoj foriros."

Mi ekkriis "Ĉiuj vesperetoj!" Mi daŭrigis: "Ĉu povas esti pli ol unu vespereto? Mi vidis nur unu vespereton flugantan en l' atikon."

Benjameno ekridis kaj respondis: "Kie oni vidas unu vespereton, tie estas multaj vesperetoj!"

"Ho ve!", mi diris al mi mem.

* * *

Bedaŭrinde, la sekvan tagon ne povis veni al la domo la plagokontrolisto, ĉar okazis malbona vetero.

Post la matenmanĝo, Kajla diris al mi: "paĉjo, mi multe legis pri la vesperetoj. Ĉu vi scias pri ilia bonfaro al la naturo? Ili manĝas multajn insektojn kaj polenas florojn."

Strange! Ŝajnis al mi, ke Kajla antaŭnelonge timis vesperetojn, kaj nun ŝi pensis, ke vesperetoj bonfaras.

Mi respondis: "Ĉu vere? Malgraŭ tio, ke ili bonfaras, kaj ke neniam ni uzas l' atikon, mi ne volas, ke ili loĝu kun ni".

La vetero malboniĝis. Ekpluvegis. Estis multaj fulmoj kaj tondroj. Subite elektran energion perdis la domo. Ĉio malŝaltiĝis. Estis tago, sed ni ne povis fari multe sen elektra energio.

Kajla kaj ŝia frato Ĵosefeto kartludis kun sia patrino. Mi kuŝis sur la kanapo kaj ekdormetis. Mi eksongis.

(La lastan parton legu en la sekva numero de la *Kongresa Kuriero*)



Societo Zamenhof kaj Belartaj Konkursoj en Mondafest' 2020, la 6-an de septembro

La Akcepto al la membroj de Societo Zamenhof (SZ) kaj la Premia Festo de la Belartaj Konkursoj (BK) de UEA okazos dimanĉon, la 6-an de septembro, kadre de la **Monda Festivalo de Esperanto (MondaFest' 2020)**. La Akcepto okazos je la 13:00 UTC (eventaservo.org/e/SZ) kaj antaŭvenos la Premian Feston, kiu okazos je la 14:00 UTC (eventaservo.org/e/1d90c8).

Ĉiujare la SZ-anoj estas akceptataj de la prezidanto de UEA en privata kunsido okaze de la Universala Kongreso de Esperanto. Ĉi-jare la Akcepto okazos virtuale kadre de MondaFest' 2020, per Zoom, kaj estos gvidata de la prezidanto de UEA Duncan Charters kaj de la ĵus elektita honora prezidanto de UEA Humphrey Tonkin, mem la fondinta prezidanto de la Societo. Tio okazis antaŭ kvardek kvin jaroj, kiam Humphrey, tiam fariĝinta nova prezidanto de UEA, anoncis en la februara numero de la revuo *Esperanto* 1975:



Societo Zamenhof estas societo interne de la Asocio mem. Ĝiaj membroj konsistas el ĉiuj niaj grandaj financaj apogantoj. Oni aliĝas al la Societo en difinita jaro aŭ per donaco de iu granda sumo al la kaso de UEA, aŭ per pago de kotizo ekvivalenta al trioblo¹ de la kotizo de Membro-Abonanto en la koncerna jaro. Aliĝinte al la Societo, oni ricevos de tempo al tempo rekte de la prezidanto de la Asocio informojn pri ĝia stato – informojn pli detalajn kaj pli ĝisdatajn ol tiuj, kiuj normale aperas en la Esperanto-gazetaro. Okazos ankaŭ speciala akcepto de Societo Zamenhof ĉiujare en la Universala Kongreso. Ni kuraĝigos la membrojn de la Societo turni sin rekte al la prezidanto por ricevi aktualajn informojn aŭ fari sugestojn pri la Asocio.

Por partopreni necesas esti ano de la Societo. Tio eblas per la aliĝilo de UEA: uea.org/alighoj/alighilo. Tiuj, kiuj aliĝos ĝis vendredo, la 4-a de septembro, ricevos ĝustatempe la alirinformojn al la virtuala akcepto.

La Premia Festo de la Belartaj Konkursoj siavice fariĝis lastatempe la kulmina momento de la plej klasika manifestiĝo de la Esperanta kulturo. La

Komisiono de la Belartaj Konkursoj, por kiu rolas kiel prezidanto kaj sekretario respektive Miguel Fernández Martín kaj Miguel Gutiérrez Adúriz, rigardas la ceremonion de disdono de la BK-premioj kiel eron de spektaklo konceptata por kunĝuado de la Esperanto-kulturo. Tial ĝi parolas pri "BK-Festo". Ĉi-jare la Festo, samkiel preskaŭ ĉiuj aranĝoj, okazas virtuale, kaj la BK-Sekretario, mem kompetenta uzanto de teknikaj rimedoj, kaj teamo de valoraj kunlaborantoj (muzikistoj, kantistoj, deklamantoj ktp.) igos la komunumon ĝoje kunfesti la mirindaĵon de nia kulturo en ĝiaj diversaj manifestiĝoj. En la okazo oni konatiĝos kun la nomoj de la konkursaĵoj kaj konkursantoj premiitaj en la 71-a eldono de la Belartaj Konkursoj de UEA. Por kunspekti kaj kunfesti tiun ĉi specialan momenton, aliru la kanalon de UEA ĉe YouTube, UEA viva (youtube.com/UEAviva) aŭ la paĝon de UEA ĉe Facebook (facebook.com/universala.esperanto.asocio), de kiuj elsendiĝos la Festo. Vi bonvenas abonni la YouTube-kanon kaj la Facebook-paĝon. Se vi volas subteni la belartan agadon de UEA, via donaco bonvenas al la Belarta Fondaĵo: uea.org/alighoj/donacoj/belarto. Ĉiuj verkoj premiitaj en la konkursoj legeblas ekde 2013 en la serio **Belarta Rikolto**, aĉetebla ĉe la Libroservo de UEA: katalogo.uea.org.



¹En tiu tempo oni aliĝis al SZ samtempe fariĝante membro de la Asocio. Pro tio, ke dumvivaj membroj estas membroj, la Ĝenerala Regularo nuntempe difinas en sia Artikolo 3.2, ke temas pri la duoblo.

Pliajn Gazetarajn Komunikadojn de UEA trovu ĉe <https://uea.org/aktuale/komunikoj>

Vi povas esti aŭtoro de la **Festivala Kuriero** kaj la **Reta Revuo!**

Por kontribui, skribu al la redakcio redakcio@revuoesperanto.org